

Annette von Droste-Hülshoff,

## Lastaj vortoj (0)

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*Laŭvorta Esperantigo*

Amatoj, kiam forpasis mia spirito,  
ne postploru min per iu larmo;  
ĉar tie, kie mi restadas, tie estas paco,  
tie lumas al mi eterna tago.

Tie, kie ĉiu ter-aflikto estas malaperinta,  
ne foriĝu via bildo al mi,  
kaj mildigon por viaj vundoj,  
por via doloro volas mi elpetegi.

Se dum la nokto blove svingas siajn seraf-flugilojn  
la paco super la mondo-regnon,  
ne pensu tiam plu pri mia tombo,  
ĉar el la stela spaco mi salutas vin.

...

Annette von Droste-  
Hülshoff,

## Lastaj vortoj (1)

*tradukita de Manfredo Ratis-  
lavo*

*1a traduk-versio*

Karuloj, kiam pasis mia  
Spirit', pri mi ne ploru vi;  
Ĉar lumas jen en paco Dia  
Eterna tago ja al mi.

En tiu senaflikta foro  
Memoru daŭre mi pri vi,  
Por viaj vundoj kaj doloro  
Mildigon volas peti mi.

Se nokte per flugilo sia  
Pac' tuŝas tiun mondon ĉi,  
Ne pensu plu pri tombo mia,  
Vin de l' stelar' salutas mi.<sup>2</sup>

...

Annette von Droste-Hülshoff,

## Letzte Worte

Geliebte, wenn mein Geist geschie-  
den,  
So weint mir keine Träne nach;  
Denn wo ich weile, dort ist Frieden,  
Dort leuchtet mir ein ew'ger Tag.

Wo aller Erdengram verschwunden,  
Soll euer Bild mir nicht vergehn,  
Und Linderung für eure Wunden,  
Für euern Schmerz will ich erflehn.

Weht nächtlich seine Seraphsflügel  
Der Friede übers Weltenreich,  
So denkt nicht mehr an meinen Hügel,  
Denn von den Sternen grüß' ich euch!

...

Annette von Droste-  
Hülshoff,

## Lastaj vortoj

*tradukita de Joseph Ferdinand  
Berger*

Amatoj, kiam min forlasis  
spirit', ne ploru do pro mi!  
Por paca ekzistad' min kaŝis  
en brila tag' la bona Di'.

Ne estas plu ĉagreno tera.  
Eternas via bild' ĉe mi.  
Mi petos pri balzamo vera  
por vundoj kaj dolor' de vi.

Se svingas Pac' en nokta ombro  
Serafflugilojn super Ter',  
ne pensu plu pri mia tombo!  
Salutas mi el stela sfer'.

...

<sup>2</sup>aŭ: Ĉar de l' stelar' salutas mi.

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2004-05-16.*

*Arg-160-475 (2004-05-16 17:17:06)*

*Proksimuma laŭvorta Esperantigo de la origina germana-lingva teksto*

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-05-15.*

*Arg-160-316 (2004-05-16 13:55:41)*

*La origina versio de tiu ĉi poemo estas laŭ informo de l' 06.02.2003 fare de d-rino Edda Baußmann de la societo "Annette von Droste-Hülshoff" (Am Haus Rüschaus 81, D-48161 Münster/Westfalen, Germanio, bausmann@droste-gesellschaft.de, www.droste-gesellschaft.de) ne verkita de la poetino mem sed de ŝia nevino Elisabeth, post ŝia morto.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 - †1848-05-24).*

*Arg-160-315 (2004-05-27 10:56:26)*

*Dies Gedicht ist jedoch nach neueren wissenschaftlichen Erkenntnissen nicht von der Dichterin selbst verfasst worden, sondern, nachdem Annette verstorben war, von deren Nichte Elisabeth von Droste-Hülshoff (1845 - 1912). Man hat es aber bisher der Annette von Droste-Hülshoff zugeschrieben. Dies ist mir, Manfred Retzlaff, am 6. Februar 2003 von Frau Dr. Edda Baußmann, wissenschaftliche Mitarbeiterin der Droste-Gesellschaft (Am Rüschaus 81, D-48161 Münster, bausmann@droste-gesellschaft.de - www.droste-gesellschaft.de) fernschriftlich mitgeteilt worden.*

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de JOSEPH FERDINAND BERGER (\*1894-10-07 - †1976-03-28) en 1958.*

*Arg-160-467 (2009-11-22 09:37:58)*

*Tiu ĉi traduko de la poemo estas unue publikigita en 1958, ĝi aperis en la Esperanto-revuo "Norda Prismo", n-ro 58/2, sur paĝo 74. Vidu ankaŭ la ttt-ejon "http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/np/np5802/lastaj.html" de s-ro Donald Harlow el Pinole CA-94564, Kalifornio. Malgraŭ la supra indiko la poemo ne estas verkita de la poetino mem, sed - laŭ pli nova scienca ekono - de ŝia nevino Elisabeth, post la morto de Annette von Droste-Hülshoff. Oni ĝis nun nur atribuis la poemon al Annette von Droste-Hülshoff.*

*Pri Joseph Ferdinand Berger rigardu ankaŭ la retejon http://wapedia.mobi/eo/Joseph\_Ferdinand\_Berger#2. .*